


Kongresa Gazeto

La Kongresa Gazeto
aperas ĉiutage dum
:: la kongreso. ::



: Unu ekzemplero :
estas senpaga, pluaj
ekzempleroj kostas
: po 10 pfenigojn. :

por la IV. Internacia Esperantista Kongreso

Dresdono, 16^{an}—22^a de Aŭgusto 1908.

Redakcio: D^{ro} Schramm. — Presejo: F. Emil Boden, Dresdono.

No. 1

Dresdono, 16^{an} de Aŭgusto 1908.

No. 1

Nia Esperanto vivas.

Ni kongresas ĉiujare
Por festadi gajan feston,
Tial venis ni grandare,
Sopirante la ĉeeston.

Post laboro kaj penado
Nun postulas ni ripozon.
Post ĉornega laborado
Ni deziras nun la rozon!



Nia Esperanto vivas,
Floras ĉie sur la tero,
Ĉie nia lingvo servas
Al la bono, belo, vero.

Nia Esperanto vivas,
Tion montru la kongreso,
Flue, lerte ni parolas:
Nia estas la progreso!

Marie Hankel.



Kvara internacia Esperanto-Kongreso

Dresden, 16.—22. de Aŭgusto 1908

sub la altega protektorato de lia moŝto la reĝo Frederiko Aŭgusto de Saksujo.

Honora prezido kaj honora komitato:

Ministro de la kulto kaj de la publika instruado D^{ro} Beck, ekscelenc. Ĉefurbestro sek. financa konsilano Beutler. Ministro de la en- kaj eksterlandaj aferoj D^{ro} grafo von Hohenthal kaj Bergen, ekscelenc. Ministro de la reĝa domo von Metzsch-Reichenbach, ekscelenc.

Komerca konsilano Georg Arnhold. Reĝa Wurttemberga konsulo, komerca konsilano Max Arnhold. Parlamentano Bernhard Behrens. Rektoro em. D^{ro} Bernhard, ĉefkonsilano del' studado. Ĉefdirektoro Buddecke. Barono (Freiherr) von Braun, reĝa kaj imp. aŭstra-hungara ambasadoro kaj aŭtorigita ministro. Sekreta komerca konsilano Collenbusch, membro de la komerca parlamento. Imperia turka konsulo F. Chrambach. Ekscelenco generaleŭtenanto z. D. P. von Criegern. Ekscelenco generaleŭtenanto z. D. von Criegern, Kämmerer de Lia Moŝto reĝo Frederiko Aŭgusto. Ĉefkonsistoria konsilano superintendente D^{ro} teol. kaj fil. Dibelius. Ĉefredaktoro W. Dönges, reĝa saksa konsilano. Nederlanda konsulo W. C. van Ameyden van Duym. Reĝa grandbrita ministerrezidento M. de Cardonnel Findlay. Konsulo komerca konsilano Flössner. Ĉefdirektoro komerca konsilano Förster. Bankdirektoro Max Frank. Ĉefkonsulo de Usono T. St. John Gaffney. Verkisto F. A. Geissler, prezidanto de la unuigo „Dresdena presanaro“. Cornelius Gurlitt. Ĉefkonsulo Alfred Gutmann. Konsulo Erich Harlan. Ekscelenc milita ministro Freiherr von Hausen, generalo de la infanterio. Urba delegito, parlamentano Hettner, landjuĝa direktoro. Urba delegito D^{ro} med. Hopf. Komerca konsilano Otto Hösch. Reĝa greka konsulo Jasmatzi. Verkisto Georg Irrgang, redaktoro. Ĉefkonsulo Ernst Eugen Kaps. Sekreta konsilano von Kirchbach, ĉefdirektoro de la ŝtataj fervojoj. Reĝ. imp. aŭstra hungara ĉefkonsulo komerca konsilano Klemperer. Urba konsilano D^{ro} Koch. Ekscelenco efektiva sekreta konsilano D^{ro} grafo von Könnertitz auf Lossa. L. Freiherr von Koenneritz, reĝa saksa kammerherr kaj majoro z. D. Polica prezidanto Köttig. Urbestro D^{ro} Kretschmar. Amtshauptmann D^{ro} Krug von Nidda. Sekreta konsilano, profesoro Gotthard Kuehl. Sekreta

lerneja konsilano D^{ro} Lange. Ĉefpoŝtdirektoro, sekreta poŝta konsilano Lehmann. Ĉefredaktoro, profesoro D^{ro} Lieber. Sekreta komerca konsilano K. A. Lingner. Profesoro Lossow, direktoro de la reĝa artmetia lernejo. Sekreta komerca konsilano, reĝa hispana konsulo Lüder. Urba lerneja konsilano, profesoro D^{ro} Lyon. Redaktoro Guido Mäder, prezidanto de la loka unuigo Dresden de la emeritejo de germanaj ĵurnalistoj kaj verkistoj. Urbestro D^{ro} May. Prezidanto, sekreta konsilano D^{ro} Mehnert. Sekreta kortega konsilano, profesoro D^{ro} Möhler, rektoro de la reĝa teknika supera lernejo. Sekreta legacia konsilano, reĝa bavara Kämmerer Eduard grafo von Montgelas, reĝa bavara e. o. ambasadoro kaj aŭtorigita ministro ĉe la reĝa saksa kortego. Reĝa rumana konsulo Mühlberg. Generaleŭtenanto von Müller, ĉefadjutanto de lia moŝto la reĝo. Konsulo Alexander Neubert, Konsulo Willy Osswald. Ekscelenc jurista ministro D^{ro} von Otto. Reĝa grandbrita vickonsulo Ch. W. Palmié. Sekreta kortega konsilano, profesoro Hermann Prell. Reĝa inspektoro de distriktlernejoj, lerneja konsilano D^{ro} Prietzel. Komerca konsilano D^{ro} Reichardt. Reĝa bavara ĉefkonsulo, komerca konsilano Reichel. Ekscelenc financministro D^{ro} jur. von Rüger. Kreishauptmann D^{ro} jur. Rumpelt. Episkopo, apostola vikaro D. teol. Schäfer. Ministreja direktoro sekreta konsilano D^{ro} Schelcher. Reĝa portugala konsulo Scheller. Generalmajoro z. D. Schmidt. Sekreta konsilano Ernst Edler von Schuch, reĝa ĉefmuzikdirektoro. Ekscelenc grafo von Seebach, efektiva sekreta konsilano, ĉefdirektoro de la reĝa muzikokapelo kaj de la reĝaj teatroj. Konsulo F. Stalling. Urba delegitestro, jurista konsilano D^{ro} Stöckel. Imperia parlamentano, urba delegito sindykos D^{ro} Stresemann. Reĝa norvega konsulo Täubrich. Konsulo G. Tiedemann. Urba delegito-vicestro D^{ro} P. Vogel, saksa parlamentano. Ekscelenc ministreja direktoro, efektiva sekreta konsilano D^{ro} Waentig. Imperia rusa minister-rezidento Baron A. von Wolff. Ĉefredaktoro Julius Wolff. Reĝa sveda kaj persa ĉefkonsulo Wunderlich. Ekscelenc efektiva sekreta konsilano D^{ro} teol. von Zahn, Prezidanto de la evangelia luterana landkonsistorio.



Sabaton, la 15^{an} de Aŭgusto.

Matene:

9^h: Malfermo de la akceptejo, de la ekspozicio kaj de la vendejo en „Technische Hochschule“.

Grava avizo: La akceptejo estas nek babilejo nek atendejo nek restejo, sed nur akceptejo. La akceptejo estas malfermito ĉiutage de la 9^a ĝis la 1^a kaj de la 2^a ĝis la 7^a (escepte dimanĉe). Estas nepre necese, ke ĉiuj kongresanoj portu kun si la kongresan karton, por kiu ili ricevos la karton por la tramveturiloj kaj la presajojn.

10^h: Organiza komitato (Technische Hochschule, ĉambro 60).

11^h: Lingva komitato (Technische Hochschule, ĉambro 83).

3^h: Kunveno de la Germana Esperantista Societo (Technische Hochschule, ĉambro 96).

4^h: Kunveno de la Internacia Scienca Asocio (Technische Hochschule, ĉambro 60).

8^h: Amika kunveno en la Dresden'a Grupo (Granda salono de la „Vereinshaus“). Muzikaĵoj kaj teatraĵoj.

Amika kunveno en la granda salono de la Vereinshaus donita per la Societo „Esperanto“ Dresdeno.

PROGRAMO.

Ĥoro sub la direktado de S^{ro} Kurt Blumentritt.

1. Preludo per orgeno.

S^{ro} Kurt Blumentritt.

2. Ĥoro kun orgeno: Kanto de Ligo W. A. Mozart.

3. Salutado de la prezidanto de la Dresdena grupo D^{ro} A. Schramm.

4. Ĥoro: Venu Dresdenon Peters.

Tradukis: Hugo Marx.

5. Prologo: S^{ino} Aurelie Elb.

6. Ĥoro: Esperantista himno

„La Espero“ F. de Ménéil (Paris).

Poezio de D^{ro} Zamenhof.

7. Ĥoro: Paca Kanto de la Esperantistoj.

Tradukis: Profesoro G. Sellin (Schwerin).

8. Humorplenaj kantoj por Soprano: *)

a) La vana averto Bernhard Schneider

(Dresden).

Esperanta teksto de Friedrich Radeck (Dresden).

b) Hanzo kaj Lizo (popola melodio).

Esperanta teksto de Friedrich Radeck.

c) La repacigo Bernhard Schneider.

Esperanta teksto de Friedrich Radeck.

Fino Isolde Hahn (Dresden).

9. Popolaj kantoj por ĥoro:

a) Rozeto en herbejo (popola melodio) H. Werner.

b) La verda stelo Cl. Braun (Dresden).

Esperanta poezio de S^{ino} M. Hankel (Dresden).

10. Humorplena kanto: La babilbuŝeto Bernhard Schneider.

Esperanta teksto de Friedrich Radeck.

S^{ro} Friedrich Radeck.

11. La tulipulinoj el Harlem. Rondo-

danco kun kanto Barth-Erlensteg.

Finoj Kiessling, Laue, Poscharsky kaj Thomas.
aninoj de grupo Pirna.

Jen mi, la blonda Trudo,

Kaj mi, mi estas Katarin'.

Mi nomas min Haninjo,

Kaj mi la Wilhelmin'!

Ni tulipulinetoj

El Haarlem ĉe la Waterkant',

Kun niaj tulipbulboj

Migradas ni tra l'land'.

Gepatroj ambaŭ niaj,

Gefratoj, kaj la parencaj'

Tulipojn kulturadas

De multaj, multaj jar'.

Kaj tial, se vi venos

Al Haarlem ĉe la Waterkant',

Vi vivos feliĉege

En vera floroland'.

Kaj se ni pligrandigos

Kaj iam havos dudek jar',

Ni tiam edziniĝos

Kun ia tulipvir'!

Kun niaj karuletoj

El Haarlem ĉe la Waterkant',

Kvar kulturistparetoj,

Ni migras tra la land'.

(Trad. Marx-Schmidt)

12. Tie ĉi oni parolas Esperante.

Unuakta komedio de T. Williams (1859).

Tradukita kaj aranĝita de M. Hankel.

Personoj.

Majoro Raten S^{ro} E. Heydweiller.

Sinjorino Julieto Raten, lia edzino Fino J. Keck.

Sinjoro Bergwald S^{ro} H. Arnhold.

Sinjorino Bergwald, lia edzino Fino G. Bernhard.

Elza, lia filino Fino K. Bär.

Viktor Dubois S^{ro} S. Winkelmann.

Berta, scrivistino Fino E. Zschockelt.

Policano, Komisiisto.

Loko: Dresden. Tempo: Hodiaŭ.

La Esperantistaro ne miru, ke la Kvaro elektis komedion de brita verkisto por la salutfesteto de la 15a de Aŭgusto. Sed la epizodo de la malnova verketo (1859) estas tiel konvena al nia bezono, ke la grupo decidis ĝin ludi. Krom tio la komedio preskaŭ estas internacia posedaĵo, la limoj de la origino ofte estas nedifinaj. La titolo de la angla komedio estas: „Ici on parle français.“ Brita familio en banloko rapide lernis la francan lingvon, por ke ĝi pli facile ludonu ĉambrojn al francoj. Estas facile ŝanĝi la komedion tiamaniere, ke ĝi ŝajnas elpensita por la Esperantista kongreso. Sed la ideo mem, la kerno apartenas al T. Williams, bone koata aŭtoro de multaj teatraĵoj.

*) Eldonejo: Alwin Huhle (Dresden). — Vendejo: En la salonego hodiaŭ vespere kaj en la vendejo de la ekspozicio. (Supera Tehnika Lernejo.)

Dimanĉon, la 16^{an} de Aŭgusto

Matene:

- 10^h: Katolika diservo en la „Herz-Jesu-Kirche“ (preĝejo de la S. S. Koro de Jesuo). Prediko de l' Abato Pichot. Solena meso.
[Oni povas veturi al la preĝejo de la ĉefstacidomo per la tramveturilo 28].
- 11^{1/2}^h: Luthera diservo en la „Kreuzkirche“ (krucpreĝejo). Prediko de la pastro Kühn, Dresden.
[Por la diverso oni ricevas separatajn programojn en la preĝejoj].

Posttagmeze:

- 1^h: Tagmanĝo en la kelo de la centra teatro*) (eniru el la Pragerstrato).
- 3^h: Kunvenoj laŭ nacioj por elekti delegitojn (Technische Hochschule). Pri tiuj ĉi kunvenoj vidu la sciigojn sur la nigra tabulo.
- 4^h: Kunveno de la teologiistoj (tradukantoj de la biblio (Technische Hochschule ĉambro 60).
Kunveno de la antialkoholuloj (Technische Hochschule ĉambro 83).
- 4^{1/2}^h: Publika kunveno de la liberpensuloj kun muzikaj prezentadoj sub direktado de S^{ro} profesoro René Deshayes. Parolado de profesoro Bourlet pri la „Libera Penso“. Salutado per la Dresdena grupo de la Germana Monistunuigo. Kunvenejo: Helbig, Weisser Saal (blanka salono) ĉe Theaterplazo.
- 5^h: Amika Kunveno en la „Granda Reĝa Ĝardeno“ (Grosser Garten).

Vespere:

- 8^h: en la granda salono de la Vereinshaus: Parolado de profesoro D^{ro} A. Schmidt: „Kial apartenas la estonteco al Esperanto“ en germana lingvo por neesperantistoj germanoj. Parolas ankaŭ aliaj oratoroj, inter ili S^{roj} Moscheles el Britujo, profesoro Cart kaj profesoro Bourlet el Parizo k. t. p.
- 8^h: en la malgranda salono de la Vereinshaus.

PROGRAMO.

1. Prologo: Al la fratoj.

Poezio de D^{ro} L. Zamenhof.
S^{ro} Profesoro Simon (Wien).

2. Du kantoj:

a) La Kanto de l' Cigno *F. de Ménil.*

Tradukis: S. Sviridov.

b) Birdoj forflugu *Josée Guivy.*

Tradukis: Saynaeve.

S^{ino} Guivy (Paris). Pianoforta akompano: F^{ino} Eva Malzmann (Dresden).

3. Ĥoro: a) Paca Kanto de la Esperantistoj.

Esperanta teksto de S^{ro} Profesoro Sellin (Schwerin).

b) La verda stelo.

Esperanta poezio de S^{ino} M. Hankel (Dresden).

Ĥoro sub la direktado de S^{ro} Kurt Blumentritt.

4. Kantoj por Soprano:

a) Regas Paco sur la Mar *Ad. kaj H. Sefer.*

Esperanta teksto de Ad. Sefer.

b) Vilanelle *E. Dell' Acqua.*

Esperantigita de A. Sefer.

F^{ino} Adele Sefer (London). Akompano: F^{ino} Eva Malzmann (Dresden).

5. Deklamo: Poemoj hungaroj.

S^{ro} Marich (Budapest).

6. Kantoj por Soprano:

a) Asilo kontraŭ pluv' kaj vento *R. Kahn.*

b) La tilio

c) La rozeto

d) Pafista kanto Popola melodio.

F^{ino} Käthe Jahns (Braunschweig)

7. Deklamo:

a) Post la batalo *Victor Hugo.*

Tradukis: E. Boirac.

b) Ĝis la revido *Clarence Bicknell.*

S^{ino} Rosa Junck (Bordighera).

8. Du Kantoj:

a) La reĝ' de Tulo. Muziko *de Mando Valérie White.*

Vortoj de Goethe. — Tradukitaj de Clarence Bicknell.

b) Memoruj. Muziko *G. H. Stone.*

Vortoj de J. C. Smale. — Tradukitaj de Clarence Bicknell.

S^{ino} A. E. Mudie (London).



9. Himno esperantista „La Espero“ *F. de Ménil.*

Esperanta poezio de D^{ro} L. Zamenhof.

Direktanto: S^{ro} Kurt Blumentritt.

*) Ĉi-vespere je la 7a vespermanĝo en Zacherlbräu, König Johannstrato la etaĝo por tiuj, kiuj deziras kune vespermanĝi.





N^o. 2a.

La Kanto De L' Cigno.

Trad.: S. Sviridov.

Muziko: F. de Mènil.

Stel' falas de nokta ĉielo
De alt' kie reĝas la hel',
Ĝi estas de l' amo la stelo
Falanta de nokta ĉiel'.

Pomarba folio kaj floro
Faladas sub spiro de sud'
Allugas mokanta venthoru.
Komencas en park' ĝia lud',

Plaŭdetas la cigno naĝanta
Kaj kantas sur laga profund',
Kaj jen mallaŭtigas sonkanta
La cign' trovas tombon en ond',

Ho, kia mallum', kaj silento!
Rompiĝis la stel' diamant',
Pomflorojn forportis la vento,
Finigis de l' cigno la kant'.

N^o. 2b.

Birdoj forflugu!

Trad.: Seynacov. El Guido Gezelle.

Josée Guivy.

Birdoj forflugu;
Estas malvarme
Kaj malgaje.
Flugu, ho birdoj,
For de l' malvarmo,
For de la homoj.
Ĉar la homo
Vin ne amas.
Flugu: li volas
Per la pafilo
Vin mortigi:
Tion li revas.
Ho! vi forflugu
Kie ne povas
Vin atingi
La sagulo!
Flugu alten kaj ripozadu

Nur vidante landon senhoman.
Flugu!

Flugu: dufoje
Vi ne aliru
Al malbona
Tiu homo.

Birdoj forflugu!
Estas malvarme
Kaj malgaje.
Flugu ho birdoj,
For de l' malvarmo.
For de la homoj,
Ĉar la homo
Vin ne amas.

N^o. 4a.

Regas Paco sur la Mar'.

Muziko kaj teksto originale verkita por la 4^a Kongreso de Ad. Sefer (Schafer) L. K.

Regas paco sur la mar'.
Post vantega ventblovado
Kaj senfrukta ondskuado
Vent' subiĝas al ondar'.
Eĉ post forta ventfanfaro

Ektremetas nur la maro
Estas vanta lia bru' (dufoje).
Blovu, ho vento! — Ventfanfaronado
Nur ekskuetas supraĵon de la mar'.

Ĝia fluado eterne daŭradas,
Daŭras pro beno al la homar'. —
Per surtera kordolor'
Per perad' kaj ĉapreniĝo

Venas poste trankviliĝo
Kvietiĝas nia kor'.
Fortiĝinte ni laboras;
Amo, ĝojo sli ekfloras
Post elporto de dolor' (dufoje),

N^o. 4b.

Villanelle.

(Jen, hirundet' forflugas).

Esper. de Ad. Sefer.

Muziko de: E. Delé Acqua.

Jen hirundet' forflugas
Tra la aŭtuno aer'
Al suda land', trans la maro
Al varma sunradiaro
Kien ĝin vokas mister'
(Jen hirundet' forvagas).

Mi rigardas ĝin kun mir'
Rigardantan kun doloro

Min ravegas dolĉmemoro
Ke, ektremas korsopir' — ah —
Pro enviro de l' forir'.
(Kvazaŭ Parolata).

Ho, se nur mi povus flugi
Trans la maro kun birdet'.
Ho, jen forvagas hirundo
Trans la vasta oceano.

N^o. 6a.

Asilon kontraŭ pluv' kaj vento.

Rob. Kahn.

Asilon kontraŭ pluv' kaj vento
Nur serĉis mi.
Mi trovis la ĉielan benon
De l' eternecc'.

Ho vort', kiel vi pruvis vin:
Modesta hom', atingos plu.
Deziris mi ripozon nur,
Kaj celon trovis mi.

Gastaman lokon mi deziris,
Sed nun al mi
Amanta kor' kontraŭ espero
Dediĉis sin.

Ho vort', kiel vi pruvis vin:
Modesta hom' atingos plu.
Mi revis nur pri vintrestad',
Sed amo kaptis min!

N^o. 6b.

La tilio.

Schubert.

Ce l'puto antaŭ l'urbo
Jen staras la tili',
En kies ombro dolĉe
Revadis ofte mi,
En ĝia ŝel' tranĉite
Vidiĝas ama dir',
Kaj daŭre min altiras
Al ĝi la korsopir'.
Hodiaŭ, ĉe noktmezo,
Mi pasis ĝin, migrul',
Ho! Spite la malhelo
Fermiĝis la okul'.
Sed ĝiaj bonaj branĉoj
Alvokis ŝajne min:
„Alvenu do, junulo,
Ni repacigos vin!“

Alblovis vent' malvarme
Kun granda energi',
Ĉapelon ĝi fortiris,
Sed ne turniĝis mi.
Kaj nun, post kelka mejlo
De interspaco, ho!
Ankoraŭ bruas l'arbo:
„Ce mi paciĝu do!“

N^o. 6c.

La rozeto.

Schubert.

Knabo vidis, jen rozeto
Sur la kampo staras,
Bela, juna la floreto,
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras,
Sur la kampo la rozet'.
Kiel infanet'.
Knabo diris: mi eltiros
Belulinon mian,
Floro diris: vi foriros,
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian.
Sur la kampo la rozet',
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
La rozeton prenis,
La floreto batalante,
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet',
Kiel infanet'.

N^o. 6d.

Pafista kanto.

Kun pafark' kaj sago
Tra montara mond'
Vagas antaŭ tago
La pafist' en rond!

Kiel de l'aglaro
La ĉielacr'
Tiel ŝtonegaro
Estas lia sfer'.

En montarvastajo
Kion trafis sag',
Estas la kaptajo
De pafista ag'.

N^o. 8a.

La Reĝ' de Tulo.

Vortoj de Goethe. Trad.: de Clarence Bicknell. Muĝ. Maude Valérie White.

Al reĝ' de Tulo foje,
Mortanta amatin'
Pokalon oran donis
Por la purpura vin'.

Ĉi estis pli ŝatata
Ol ia ajn trezor'
Sed gutis liaj larmoj
Je l' trinko de l' likvor'.

La reĝ, mortonte, donis
Al fil' — amante lin —
Bienoĵn — sed la tason —,
Ne! Li ne donis ĝin.

En sia dom' antikva
Ĉe l'bordo de la mar'
La nobla reĝo kuŝis
Kun sia sekvantar'.

La lastan fojon trinkis
La reĝo kun pasi'.
Kaj tiam la pokalon
Malsupren ĵetis li!

Ĉi falis en la ondojn
Kun teruriga bru'
Li mortis! De l' pokalo
La reĝ' ne trinkis plu!

N^o. 8b.

Memoru.

Vortoj de J. C. Smale. Trad.: de Clarence Bicknell. Muĝiko de G. H. Stone.

Ha! Kiam velkas la florar'
Memoru
La ĝojon de estinta jar'
Memoru
En pluvo de l' antaŭa hor'
En tempo de l' viol-odor'
Memoru
Kaj estu gaja, sen dolor'.
Memoru, memoru.

Ha! brilas la trankvila lun'
Memoru
Sed pri la sort', perdita nun
Memoru
Malluma nokto kovras min,
Sed ke mi ĉiam amas vin
Memoru
Nenion plu, ho amatin'!
Memoru, memoru.

De lundo, la 17^{an} de Aŭgusto, turnu sin oni pri ĉiuj loĝejaj aferoj al la loĝeja firmo

Lyon & Co., Pragerstr. 39

(apud la hotelo „Eüropaeischer Hof“).

La plej nova noveco

en la specialaĵo de la skribmaŝinoj:

Mignon-Skribmaŝino

Prezo **100 M.** tute nete.

Plej bona fabrikaĵo. — Konstruo genie simpla.

Mignon - Skribmaŝino havas la grandan preferon, ke oni povas skribi sur tiu maŝino sen ia temperdo en 12 diversaj lingvoj:


en
esperanta,
germana,
franca,
hispana,
portugala,
sveda,
rusa,
pola,
hungara,
bohema
k. t. pl.

General-Vertretung:

J. Bargou Söhne

DRESDEN

54 Wilsdruffer Strasse 54



„Se mi nur sciis,

kie mi povus aĉeti ian konvenantan vestaĵon, fakte bonege fabrikitan!“

„Nenio pli simpla ol tio!“

Iru al

Karlo Meyer

Dresdono-Neustadt.

Ĉefstrato 17/19.

Speciala komercejo por eleganta vestaro.

Mi sendas ĉien.



Oficejo por loĝejoj

LION & C^{IE}.

Munĥeno Kaselo Visbadeno

Dresdono

Prager Strato 39

Telefono N° 5171 („Sendig“hotela domaro)

donas senpage sciigojn pri lueblaj kaj aĉeteblaj privatdomoj, loĝejoj, komercĉambroj k. t. p. kaj pri ĉiuj demandoj rilatantaj la kolonizadon.

Samideanoj!

Artistfotografisto James Auriq

Telefon 2488. Blasewitz - Dresden Telefon 2488.

kontraŭ la poŝtoŝeĵo, haltejo de la tramvojo 1

Rekomendas vin por ĉiuj spezoj da fotografiaĵo. Grupojn k. t. pl. Spezialito estas fotografiaĵo en la domo aŭ hotelo.

!!! Eksposicio en la teĥnika lernejo. !!!

Anonco por kongrespartoprenantoj aŭ iliaj konatuloj, kiuj intencas transloĝigi Dresdenon, unu el la multe satataj loĝadurboj de la tuta mondo.



Vilaro Altfriedstein

en Niederlössnitz apud Dresdeno
15 minuta veturado.

Saniga alteta situacio. Plej vasta panoramo. Apuda arbaro. Malkaraj impostoj. Viloj de post M. 20000.—.

Tre grandaj kaj belaj bienoj. Malkaraj landpecoj por konstrudo. Prospektoj senpagoj per la Dresdona Societo por vilkonstruado Neubert & Co., Dresdeno-N., Kurfürstenstr. 24.

Redaktoro

germanlingva, kiu perfekte posedas Esperanton skribe kaj parole estas serĉata por

Esperanta Ĵurnalo en Germanujo.

Kelka kono de fremdaj naciaj lingvoj estas tre dezirata. Salajro laŭ la kapablecoj, kiujn la aspiranto povos pruvi. Proponoj estas sendotaj sub D. D. 674 an Haasenstein & Vogler A.-G., Leipzig.

Legu la ilustritan gazeton:



„La Bela Mondo“

Jus aperis nova, bone kaj multe
ilustrita gazeto

La Bela Mondo

eldonita
de la Kvarano D^{ro} Schramm.

Unu numero kostas . . . 0,60 M. (0,30 sm)
1/2 jaro kostas 3,00 M. (1,50 sm).

F. Emil Boden, eldonejo
Dresden, Bismarckplacò 12.

Sächsisches Esperanto-Institut

DRESDEN.

Begründet von einer Anzahl sächsischer
Gross-Industriellen.

Auskunftstelle über Esperanto, Übersetzungs-
Büro.

Unterrichts-Institut für Esperanto.

(Kosten des Unterrichts: 5 M. einschl. Lehrbuch).

Die Unterrichtskurse beginnen in der
ersten Woche des September.

Anmeldungen an Dr. SCHRAMM, Dresden,
Ständehaus.

Germana Esperantista Societo

(G. E. S.)

Deutsche Esperantisten-Gesellschaft

(Eingetragener Verein).

Aufgabe der Gesellschaft, die gleichzeitig den offiziellen
Verband deutscher Esperantisten und Esperanto-
Freunde darstellt, ist die Ausbreitung des Esperanto
als internationale Hilfssprache und Förderung des Es-
perantismus unter Ausschluß politischer und religiöser
Nebenzwecke. — Als Verbandsblatt erhalten die Mit-
glieder vom Eintritt ab unentgeltlich die Monatsschrift

„Germana Esperantisto“

Diese in Deutsch und Esperanto erscheinende Zeitung
im Mindestumfang von je 12 Quartseiten unterrichtet
schnell und zuverlässig über alle Esperanto betreffenden
Angelegenheiten.

Beitrag für das Kalenderjahr 3.05 Mark,
:: bei Auslandsporto 4 Mark. ::

Geschäftsstelle: Altona a. E., Marktstr. 68.

Esperantista Eldonejo F. EMIL BODEN

:: Dresden-A., Bismarckplaco 12. ::

Kongresa Kantareto (kun notoj) eldo-
nita de la Kvaro por la Kvara.

Prezo 0,50 M. = 0.25 Sm.

Lexikon deutscher Redensarten,
bearbeitet und in Esperanto übertragen von
Wilh. Velten, Rektor em. und R. Richter, Ver-
kehrsinspektor a. D.

Preis 2,50 M. = 1.25 Sm.

Reimregel nebst Tabelle zur leichteren Er-
lernung der Fürwörter, unbestimmten Zahlwörter
und Umstandswörter von F. Radeck, Dresden.

Preis 10 Pfg.

:: Leterpaperoj kaj Poŝtkartoj ::

kun esperantistaj signoj kaj ilustraĵoj.

Prezo 1—2 M. = 0,50—1 Sm por cent pecoj. Modelojn
kontraŭ antaŭsendo de 0,40 M. = 0.20 Sm afrankite.

Kongreso Gazeto



Ala kvara kongreso

La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo.

La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo.

La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo.

La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo. La kongreso komencis la 15an de marto en la mateno de la 10a horo.

Mardon, la 18^{an} de Aŭgusto.

Matene:

9^h: Agada kunsido.

(Por nepartoprenantaj de la kunsidoj forveturo Meissenon por vizito de porcelanmanufakturo.)

11^h: Lingva komitato.

Internaciaj Stenografistoj.

Pacifistoj.

Juristoj.

Posttagmeze:

1^{20h}: Ekskurso al Meissen.

Programo por la vespero en la Geipelburg.

1. La Espero. Himno de D^{ro} Zamenhof.
Meissena urba orkestro.

2. Kantoj por soprano:

a) Ario el la opero „Figaro's Hochzeit“ *W. A. Mozart.*
Tradukis: L. Elb.

b) Hispana romanco *F. de Mènil.*
Tradukis: A. Hodoro, Merkaŭ.

c) La fierulino *H. Scholz.*
Tradukis: L. Elb.

Fino Lessy Andersen, Radebeul.

3. Deklamo:

La ligo de la feliĉoj fraŭlulinoj, t. e. needziĝontinoj.
Fino Adele Šefer, London.

4. Kantoj por baritono:

a) Kun ĝoja sono *Rudnick.*
Esperanta teksto de B. Küster, Görlitz.

b) Kiel amikoj sidas ni.
Aranĝ. de B. Küster. — Sro B. Küster, Görlitz.

5. Deklamo:

Kanto de l' diablo *C. Aymonnier.*
Dro Prof. Simon, Wien.

6. Kanta: Saksa porzelano *Alfredy.*
Tradukis: Hugo Marx, Dresden.
Fino Isolde Hahn, Dresden.

7. Komedio:

La malfeliĉuloj.

Unuakta komedio de Louis Schneider laŭ A. de Kotzebue.
Tradukis: Leopold Elb, Kötzschenbroda.

Personaro. (El 11 nacioj.)

Petro Falk, plantisto el Ameriko . . . Sro F. Radeck, Germano.
Sinjorino Ĉojo, antaŭe fraŭlino Falk,

aktorino Sino Rosa Junck, Italino.

Adelgunde Falk, cirkorajdistino Fino Adele Schäfer, Anglino.

Charles Faucon, dancinstruisto A. M. Grillon, Usonano (Filadelfio).

Johano Falk, vilaglerneja instruisto . . . Sro F. Rosengren, Svedo.

Franjo Falk, filino de Johano Fino Lily Lassoe, Danino.

Gustavo Falk, helparbaristo Sro A. Siebenschein, Aŭstrujano.

Hipolito Falk Sro F. Pujulá Y. Vallés, Katalunio.

Gotfrido Falk Sro F. Doré, Franco.

Hieronimus Akcipitro, ĵurnalraportisto . . Sro F. Zamenhof, Polo.

Mustardo, servisto de Petro Falk . . . Sro A. Sandström, Finlandano.

Regiisto: Reĝa operokantisto R. Büssel.

Dresdono. — Nuna tempo.

Textoj de la kantoj.

N^o. 2a.

Rezitativo kaj ario el „Figaro“.

Trad. de L. Elb.

W. A. Mozart.

Fine venas la horo, ke mi vin, ho
amato, ja baldaŭ ekposedos.

Zorgoj, timemaj, disflugu, for je ĉiam:
ne malhelpu la ĝojon de mia koro!

Ho, ĉirkaŭ mi aperas ŝio gaja, ankaŭ
vespero ŝajnas favora al mia amo. Venu
karulo, nokta silent' nin ŝirmas.

Ario.

Ne prokrastigu plu, mia sole amata,
La amikino sopire vin atendas,
Ne lumas jam la torĉo de la lumo,
Kaj la paco regas sur la tero.
Zefir' murmuris, fluas la rivereto,
Emas ĉiu nervo al ravego.
Odoras ja la floroj sur herbejo,

Ĉio logas al amo, al ĝojo kaj guo.
Venu karulo! Ne lasu min atendi,
Venu kara! Por ke mi kronu vin,
Por ke per rozoj mi kronu vin,
Por ke la frunto mi kronu vin,
Ke mi vin kronu per rozoj!

N^o. 2b.

Hispana romanco.

El Puschkin.

F. de Mènil.

Trad. de A. Fjodorov.

Jen mi, Jueziljo, ĉi tien aliĝis,
Jam dormas Seviljo, la nokto fariĝis.
Sur strato mallarĝa, sub hela stelar'
Mi estas kuraĝa kun glav' kaj gitar,
Vi dormas? ĉesiĝos la sonĝo pro l' kant'
Gri zul' se vekigos, liu venkos l' amant'!

Por kio do restas la pordo fermita?
Sed eble ĉe estas gast' ia kaŝita?
Jen mi Jueziljo, ĉi tien aliĝis,
Jam dormas Seviljo, la nokto fariĝis.
Jam dormas Seviljo.

N^o. 2c.

La fierulino.

Trad. de L. Elb.

S. Scholtz.

Ĉu vi, fierulino, ne volas vidi min?
Mi tute ne ĉagrenas, vi povas krudi ĝin!

Mi preteriras gaje, bukedon sur ĉapel',
Kaj kantas petolajon kun tre plesura mien'.

Sed kiam post barilo, mi staras kun dolor',
Neniu mian vidu okulon je esplor'.

Kun ĝoja sono.

Kun ĝoja sono volas mi
Prikanti niajn virinojn,
Mi volas glori tie ĉi
De l' vivo belajn feinojn!
Vi belulinoj, aŭdu min,
Vi ĉarmaj sampensulinoj:
Ni, adoregas ĉiujn vin,
Vi estas niaj diinoj!

Vin dolĉulinojn laŭdas mi,
Vin rozon ruĝan kaj helan;
Fervore, kore helpas vi
Forigi ĉion malbelan.
Amemo via montras sin
Al ni do kiel rivero;
Ho, ni admiras tute ĝin
La plej belegan surteroj!

Kaj vian fidelecon mi
Nun ĉefgloras kun ĝojo;
Modelo estos ĝi por mi
En nia plua kunvojo.
Korege vin salutas ni
Kaj petas: restu diinoj
Al ni amindaj, restu vi
Al Esperanto feinoj!

Nº 4b.

Kiel amikoj sidas ni.

Kiel amikoj sidas ni
Kune intime tie ĉi:
Nian laboron faris ni,
Ĉiu bone — kaj ankoraŭ pli:
:: Protio ĝojaj, pacaj tute gajaj
Estu ni, kaj plue festu ni,
Plezuraj restu ni, pro tio ĝojaj,
Pacaj, tute gajaj estu ni,
Ĝuste plezuraj nun restu ni' ::

Grava laboro okupis nin,
Plifaciligis fervoro ĝin;
Granda sukceso estos al ni,
tute certe — kaj ankoraŭ pli:
:: Protio k. t. p. ::

Familirondo ligas nin,
Kaj Esperanto kaŭzis ĝin;
Tutan la mondon venkos ĝi,
Kaj se eble — ja ankoraŭ pli:
:: Protio k. t. p. ::

Kien atente rigardas ni,
Brilas verdistelo nur tie ĉi,
Tamen ĝin baldaŭ vidos ni:
Ĉiuloke — ĝin esperu ni:
:: Protio k. t. p. ::

Saksa Porcelano.

Esperantigita de H. Marx, Dresden.

Multaj homaj ŝatas maloftaĵojn,
Kaj aĉetas bildojn armilar'
Kaj monerojn, strangajn vidindaĵojn
Kaj mirindajn bestojn el la mar'.
Kion kaptis ajn kolektemulo
Zorge enordigas sia man'.
Memorajojn de eminentulo
Venecian vitron, saksan porcelan'.
Kaj por ĉiu porcelanamanto
Vere tre havinda estas mi.
La plej lerta, sperta modelanto
Mortis ĵus, post kiam min finigis li.
„Gesinjoroj, bone do rigardu min,
Ĉar mi estas saksa porcelanulin'
Kaj aĉetemuloj, gardu vin:
Delikataĵ estas saksaj belulin'.
En la ĉambro kie mi staradis
Multaj kolektantoj trovis sin,
Pri ĵugadis, longe disputadis
Fine senescepte laŭdis min,
La sinjoroj, eĉ la maljunuloj
Ekzomenis ĉiun detalaj'
Kaj precipe ĉiuj-ĉi fakuloj
Laŭdis la koloron de l' emajlsupraĵ'

Jamang'lo venis, demandante:
„Kiu estis via la patruj?“,
„Serĉu“ diris mi al li ridante,
„Tiajn belulinojn nur en Germanuj'.“
Gesinjoroj, petas mi, ne tuŝu min.
Ĉar mi estas saksa porcelanulin'
Kaj aĉetemuloj, gardu vin
Tre rompeblaj estas tiaj belulin'.
Tiel mi atentis, en espero,
Kiu interesos sin por mi
Sed por mi ja estas ĉefafero
Ke min ankaŭ bone traktu li.
En angulo mi ne volos stari
Nek en de l' salonoj luksa sfer':
Ne vojaĝojn mi intencas fari
Vidu ĉiujn landojn sur la ter'.
Plej sekreta mia korderiro
Estas kaj plej alta mia cel'
Partopreni al la venkoiro
Sekvi al la flug' de la verda stel'.
Gesinjoroj, bone do rigardu min,
Ĉar mi estas saksa porcelanulin'
Kaj aĉetemuloj gardu vin
Vojaĝemaj estas saksaj belulin'.

Koncerto en la Meissena Katedralo.

1. Preludo sur orgeno.

Organisto Sro Siebraht, Meissen.

2. Kanto de l' ligo

W. A. Mozart.
Tradukis: Dro Zamenhof.
Meissena „Liedertafel“.

3. Patro nia

Dro J. H. Wallfisch
(Tutaj).
Tradukis: Dro Zamenhof.
Fino Lotte Gerstorfer, Meissen.

4. Ario el „la kreo“

J. Haydn.
Tradukis: Dro Hanauer. — Aranĝis: Leopold Elb.
Sro Dro Hanauer, Frankfurt a. M.

5. Preĝo

Hugo Wolf.
Poemo de Mörücke. — Tradukis: Leopold Elb.
Fino Lotte Gerstorfer, Meissen.

6. Holanda dankpreĝo

Kremser.
Tradukis: Leopold Elb. — Meissner „Liedertafel“.

Textoj de la kantoj.

Nº 3.

Patro Nia.

Nia Patro
Kiu estas en la ĉielo
Sankta estu Via nomo!
Via regno venu!
Via volo estu
Kiel en la ĉielo
Tiel sur la tero!
Nian ĉiutagan panon
Donu al ni hodiaŭ!
Kaj pardonu al ni
Niajn ŝuldojn,

Kiel ni pardonas
Al niaj ŝuldantoj
Kaj ne konduku
Vin en tenton,
Sed liberigu nin
De la malbono
Ĉar via estas la regno
Ĉar via estas la forto;
Ĉar via estas la gloro
Ĝis eterneco! Amen.

Nº 5.

Preĝo.

Ion ajn sendu di'
la amon aŭ malĝojon
mi iros ja la vojon
Kiun ordonas ci,

Tro da sufero ne taŭgas al sento
nek tro da plezuro
Ĝusta mezuro
Ĝusta mezuro
Estas en konsento.

Gesungen von Fr. Gerstorfer.

Vizito de la muzeoj.

Grupanoj de la „Societo Esperantista Dresden“ kaj de la „Sinjorina societo Esperantista Dresden“ estas pretaj, gvidi la samideanojn en la muzeoj. Renkonteĵo ĉiutage en la ŝtuparo de la „Technische Hochschule“ je la 10^a matene.

Ifigenio en Taŭrido.

Iu Amiko mia, kiu ĉeestis la provan prezentadon de Ifigenio — kaj mi kore bedaŭras, ke mi ne havis la honoron esti tie invitita — revenas entuziasmigita.

— Ĉio, ĉio, — li diras, — estas belega: ĉio estas perfekta, kaj nenia propagando nenia pruvo povas esti pli konvinka, ol tio.

Mi rapidas, karaj samideanoj, transigi al vi tiun opinion de mia fidinda amiko.

En la lasta numero de nia Kongresa Gazeto, okaze de nia „unua vespero“ mi parolis pri la perfekta elparolo de Sro Reicher kaj de lia filino; mi parolis nur pri ili, ĉar ĝis nun mi konatigis nur kun ili ambaŭ, kaj mi estas homo, kiu parolas nur pri tio, kion li mem kontrolis.

Sed certe ne kedu, karaj samideanoj, ke tio signifas, ke la eminentaj kolegoj de Sro Reicher, ne egale perfekte ludos; kaj mi persone estas konvinkita, ke Sro Decarli, la Oresto, Sro Kurt Stark, en la rolo de Pilado, kaj Sro

Oskar Fuchs, sub la vestoj de Arkas, estos ankaŭ en Esperanto la talentplenaj aktoroj, kiuj ili estas en germana dramarto.

En tio, mi tion humile konfesas, mi iom pekis, kaj mi pentas. La tragedio de Goethe estas tiel bele ekvilibrata, ke en ĝi neniu rolo estas sekundaria, ke la kvin aktoroj devas esti egalvaloraj.

Ni do fidu, kaj ni certe tiel forte aplaudos Sinjorojn Stark kaj Fuchs kiel la ceterajn.

Unu konsilon por fino.

Karaj amikoj, rapidu aĉeti biletojn, ĉar, se vi ne rapidos, vi ne povos plu havi.

Cetere malavare kaj sindone Reicher konsentis, por la kongresanoj, serion da malkaraj sidlokoj.

La prezoj de la sidlokoj estas 20 Markoj, 10 Mk., 5 Mk., 3 Mk. kaj 2 Mk.

Kiu ne povas elspezi 5 Markojn por tia plezuro, por tia propagandado!?

Carlo Bourlet.

Samideanoj!

Artistfotografisto **James Aurig**

Telefon 2488. Blasewitz - Dresden Telefon 2488.

kontraŭ la poŝtoŝeĉejo, haltejo de la tramvojo 1

Rekomendas vin por ĉiuj spezoj da fotografiaĵo. **Grupojn** k. t. pl. **Spezialito** estas fotografiaĵo en la domo aŭ hotelo.

❑❑ Eksposicio en la tehnikala lernejo. ❑❑

„Se mi nur scius,

kie mi povus aĉeti ian konvenantan vestaĵon, fakte bonege fabrikitan!“


„Nenio pli simpla ol tio!“

Iru al

Karlo Meyer

Dresdeno-Neustadt.
Ĉefstrato 17/19.

Speciala komercejo por eleganta vestaro.
Mi sendas ĉien.



Anonco por kongrespartoprenantoj aŭ iliaj konatuloj, kiuj intencas transloĝigi Dresdenon, unu el la multe satataj loĝadurboj de la tuta mondo.



Vilaro Altfriedstein

en Niederlössnitz apud Dresdeno
15 minuta veturado.

Saniga alteta situacio. Plej vasta panoramo. Apuda arbaro. Malkaraj impostoj. Viloj de post M. 20000.—.

Tre grandaj kaj belaj bienoj. Malkaraj landpecoj por konstrudo. Prospektaj senpagoj per la Dresdena Societo por vilkonstruado Neubert & Co., Dresdeno-N., Kurfürstenstr. 24.

Oficejo por loĝejoj

LION & C^{IE}.

Munĥeno

Kaselo

Visbadeno

Dresdeno

Prager Strato 39

Telefono N° 5171 („Sendig“hotela domaro)

donas senpage sciigojn pri lueblaj kaj aĉeteblaj privatdomoj, loĝejoj, komercĉambroj k. t. p. kaj pri ĉiuj demandoj rilatantaj la kolonizadon.